

Dansk



ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK



ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO



30. ARG.
OKTOBER 1958
NUMMER

10



*Partoprenintoj de la Dan-Sveda tago antaŭ la urbdomo
de Sorø post la parolado de la vicurbestro.*

DANSK ESPERANTO-BLAD

udkommer den 15. i hver måned.
Stof må være redaktøren i hænde senest
den 25. i den foregående måned.

Redaktør: *Ole Nederland*,
Primulavej 61, III, Odense.

Ekspedition: *Arne Kolle*,
Landlystvej 48, Silkeborg.

Postkonto 57274.

Abonnement: 8 kr. pr. år.
Eksterlanda jarabono 8 d. kr. aŭ 14 re-
spondkuponoj aŭ 16 U. L.-steloj.

Nova redaktoro de DEB.



La bildo montras s-ron E. Skjerninge, Hvalsø, kiu ekde la venonta numero transprenis la redaktadon de DEB.

SKIFERIO denove ĉijare estos aranĝata de la Svisa Esp.-Junularo. La ferio okazos de 26/12 ĝis 4/1 en la svisaj alpoj. Interesatoj inter 16 kaj 30 jaroj estos akceptataj. Kotizo: 90 sv. frankoj. Informojn: André Gacand, Crêt 78, La Sagne/NE, Svislando.

PRI FREDERIKSTAD, Norvegujo, aperis turisma broŝuro kun multaj belaj fotoj, eld. de la Esp.-klubo „La Kastelo“. Havebla kontraŭ 1 resp.kup. de A. Halvorsen, Trovikhamna 21, Frederikstad, Norvegujo.

LA JUGOSLAVIAN JUBILEAN KONGRESO partoprenis kiel reprezentanto de CDEL s-ro H. E. Laustsen, Flemløse. La kongreso okazis en Novi Sad de 4/7 ĝis 7/7 kaj havis 700 partoprenantojn.



D. E. F.
meddeler:

at De endnu kan nå at komme med på *efterårs-feriekursus* på Idrætsskolen i Vejle 19.—26. oktober, hvor der arrangeres kursus for begyndere og viderekomne, konversation, samt instruktion for E-lærere. De må gerne komme uanmeldt, da vi endnu har nogle få ledige pladser.

at vi havde en ualmindelig vellykket *karavanefest* i København med omtrent 80 deltagere. Karavanefesten i Vejle afholdes lørdag 18/10 kl. 18,30. De bør absolut komme til stede, da den utvivlsomt bliver lige så vellykket som den i Kbh: Også s-ro Fötinger fra Salzburg kommer. Han vil vise sine lysbilleder og bliver hele ugen ved efterårskursus. Det vil glæde ham, om også De kommer.

at vort mærkat „Læs Esperanto — og hele verden står Dem åben“ er ganske fortrinligt i propagandaens tjeneste. Det passer lige til påklæbning på *tændstikæsker*, og det virker diskret og godt. De ved, at et ark med 20 indlægges i enhver bogpakke, der udgår herfra.

at forfatterinden til *Sur Insulo Malproksima, s-ino van Hemert-Remmers*, Amsterdam, har fået et meget anerkendende brev fra den hollandske statsminister Drees for bogen, som vi har sendt ham, og som han har læst med megen glæde. Som bekendt er han gammel E-ist. Også De bør læse den bog, og De vil forstå, hvorfor forfatterinden fik så stor anerkendelse fra den hollandske statsminister. Send 5 kr. til vor girokonto 16295 — og to dage efter har De bogen.

L. Friis,

Telefon
Aarhus 57341.

Ingemannsvej 9,
Aabyhøj.

Kiom parolas la lingvojn?

la ĉina	parolata de 500 milionoj da homoj
la angla	„ „ 250 „ „ „
la hindi (aŭ hinda)	„ „ 160 „ „ „
la rusa	„ „ 150 „ „ „
la hispana	„ „ 120 „ „ „
la germana	„ „ 100 „ „ „
la japana	„ „ 100 „ „ „
la indonezia	„ „ 80 „ „ „
la franca	„ „ 80 „ „ „
la portugala	„ „ 60 „ „ „
la bengala	„ „ 60 „ „ „
la itala	„ „ 60 „ „ „
la araba	„ „ 50 „ „ „

(El „Indonezia Esp.isto“)

La alvoko al la publiko

La ĉefestraro de CDEL havis grandajn planojn pri alvoko al la dana loĝantaro lerni Esperanton. La precizan tekston de la alvoko vi povas trovi en la antaŭa numero de DEB. Ni petis diversajn konatajn personojn subskribi la alvokon, kaj 18 el ili faris tion.

Ĝis tiu punkto ni havis grandan sukceson, ĉar vere estis famaj prominentuloj, kiuj tiel subtenis nian movadon. La unua fazo de nia alvoko okazis laŭ niaj plej optimismaj planoj. La meriton pro tio havas *Albert Holst*.

Sed la dua fazo, la publikigo de la alvoko por igi la multajn neesperantistojn lerni Esperanton, preskaŭ tute fiaskis, ĉar Ritzaus Bureau neis elsendi la alvokon. Por savi la situacion la gvidanto de nia Gazetara Servo, *Sven Ziegler*, uzis tutan nokton por duplikigi la alvokon kun la subskriboj kaj sendi ĝin al ĉiuj tagĵurnaloj en la tuta lando, kaj pro tio li meritas nian dankon. La duplikaĵon li ankaŭ sendis al Ritzaus Bureau, kaj nun Ritzau elsendis parton de la alvoko, sed sen la nomoj de la subskribintoj kaj en iom kripligita formo.

La rezulto estis modesta. Laŭ la infor-

moj, kiujn ni ricevis ĝis nun, 52 tagĵurnaloj skribis pri la alvoko, sed el ili nur 11 menciis la nomojn de la subskribintoj.

La afero estas kuraĝiga por ni en tiu maniero, ke ĝi montras, ke influriĉaj homoj subtenas nin. Sed aliflanke ĝi montras, ke nia movado havas malfortajn flankojn, kaj ke unu el la plej gravaj estas niaj rilatoj al la ne-esperantista publiko. Estas bone, ke famuloj subtenas nin, sed estus multe pli bone, se la granda publiko sciustion.

Ni spertis fiaskon, kaj estas mi, kiu havas la respondecon pri ĝi. Mi nur volas diri, ke ni provu lerni de niaj eraroj kaj plibonigi tiujn flankojn, kiuj estas malfortaj. Ni perdis batalon, tion ni ne kaŝu, sed se ni mem volas, ni havas tempon por gajni novan.

Svend Dragsted.

„TUTMONDA ESPERANTISTA KOLEKTANTA ADRESARO“ estas eldonita de Esp. Kolektanta Centra Informejo“. Ĝi enhavas la adresojn (el 32 landoj) de ĉiuj esperantistaj kolektantoj kies adresojn oni ricevis rekte. Ĉe ĉiu nomo estas indikita la kolektaĵoj, pri kiuj la koncernulo interesiĝas. — Prezo de la adresaro: 4 resp-kup., adreso: 6 Place Jules Ferry, en Saint Etienne (Loire), Francujo.

Ne „Mercur“, sed . . .

La unua dana reklam-radio ne estis „Mercur“, sed fako de la oficiala dana radio, kaj ĝi estiĝis kiel incianto de esperantisto, per kaj por Esperanto.

En „Østsjællanders Folkeblad“, 23/8, inĝeniero Poul Lendorff, Køge, rakontas pri sia fondo de „Internacia Radio-Asocio“ en 1924, per kiu radioamatoroj el la tuta mondo havis intiman kunlaboron. Lendorff rakontas, kiel disaŭdigo en Esperanta traduko de grava parolado de la angla reĝo donis al li la ideon pri regulaj elsendoj en Esperanto. Kunlaborante kun reklamkompanio li sukcesis funkciigi tiajn en la kadoroj de la oficiala dana radio. Ĉiun semajnon oni havis duonhoran elsendon, el kiu la unuaj kvin minutoj okazis en Esperanto; poste venis muziko (i. a. per la persona helpo de la komponisto Fini Henriques), interrompata de diversaj reklamdevizoj.

En 1926 oni devis forigi la reklamelsendojn. Ankoraŭ dum kelka tempo Lendorff daŭrigis la Esperanto-elsendojn, sed kelkan tempon poste ankaŭ ili devis ĉesi.

Poul Lendorff estas esperantisto de 1906, en kiu jaro lia nomo venis en la adresaron de Zamenhof. Estas Lendorff, kiu siatempe en Esperanto interkontaktigis kiel amikec-urbojn la nederlandan urbon Almelo kaj Køge.

Al miaj Geamikoj en Danlando.

Pro manko de tempo mi ne povas skribi al vi ĉiuj aparte.

Tial, pere de via gazeto, mi informas vin, ke mi estas komisiita iri al Hindujo por, tie, instrui nian lingvon.

Kvankam tio estas ĝojiga fakto, tamen mi ĉagreniĝas pro la foriro el via ĉarlando kaj, pli speciale, pro la disiĝo de tiom multaj kaj afablaj geamikoj.

Estas vere, ke mi spertis grandan simpatian inter vi, kaj pro tio mi varme dankas vin ĉiujn, kiuj sukcesis sentigi al mi tiun apartan etoson, troveblan verŝajne nur en nia internacia medio, pro nia kora interkomprenilo „Esperanto“.

Eĉ dum mia fora vivado mi konservas en memoro tiun amikecon, klopodante plivastigi ĝin en la malproksimaj landoj,

tiel ke vi, kiel mi, havu tie novajn amikojn dank' al kiuj la projekto de Unesko pri „Reciproka aprezo de la orienta kaj okcidenta kulturaj valoroj“ estos antaŭenpuŝata pere de nia multprovita Internacia Lingvo.

Dezirante al vi daŭran laboremon por nia movado, mi plej sincere dankas vin pro ĉio agrabla kaj tutkore salutas vin, kun aparta penso al miaj karaj gelernintoj, kiuj dum la lastaj kvin vintroj en diversaj urboj, plezurigis min per sia studemo.

M. Haudebine, Cseh-Instruistino,
28, Av. de Laumièrè Paris (19).

Sendu telegramon al UN.

(UN, New York) kaj al UNESCO, (2 Place de Fontenoy, Paris VII, telegr.-adr.: UNESCO Paris) por en la nomo de via organizaĵo aŭ grupo esprimi vian solidarcon okaze de la 10-jara datreveno de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj la 10/12.

Ne forgesu post via aranĝo en rilato al la datreveno plej malfrue la 31/10, sendi raporteton pri nombro de prelegoj kaj de ĉeestintoj al la Ĝenerala Sekretario de UEA, 77, Grasmere Av., Wembley, Middlesex, Britujo.

La radio-elsendo

Ĉe la finredakto de jena numero de Dansk Esperanto-Blad ni ankoraŭ ne scias la daton aŭ horon de la danlingva radio-elsendo de Svend Dragsted kun la titolo „Sprogproblemer“. Sed verŝajne ĝi okazos tre baldaŭ. Ni petas niajn legantojn mem esplori la radioprogramojn de la tagĵurnaloj kaj igi kiel eble plej multajn homojn aŭskulti la elsendon.

FRANJO FRANJIC, Cseh-instruisto de Jugoslavio, komencis por Centra sian kursagadon sur Fueno, kie li havas ĉ. 80 lernantojn per 5 kursoj en Fåborg, Bogense kaj Odense.

LA KLUBA VIVO

Redaktas: S-ino I. Iburg, Sct. Clemens, Fyn.



Komence de julio okazis 2-taga urba festivalo en Fåborg. — En aŭtomobila procesio partoprenis la Esp.-klubo per jena ornamita veturilo. Krome okazis 2-taga Esp.-ekspozicio, kiun vidis pli ol 5.000 homoj. Ĝi vekis grandan intereson, kaj nun oni esperas je rezulto en formo de multaj kursaliĝoj.

*

Dum aŭgusto *Margaret E. Bowden* el Wales laŭ raportoj de diversaj kluboj prelegis pri sia Esperanta laboro kaj pri „La Budaismo kiel helpilo por paco, individue kaj internacie“.

Tre interese ŝi rakontis pri sia Esp.-laboro. Ŝi kolektis multan sperton kaj pri homoj kaj pri Esperanto. La sumo de ŝiaj spertoj estas: „Se vi deziras kontraŭbatali viajn malĝojojn, ĉagrenojn kaj dolorojn, vi devas zorgi pri viaj kunhomoj“.

F-ino Bowden ensorĉante vivigis la gravecon de la Budaismo, kiu nekonsiderante la ritarojn havas kun la kristanismo komunajn ecojn, nome la amon al la proksimulo, la pacon kaj la kompreniĝon inter ĉiuj homoj. Kaj tiujn kvalitojn ni speciale kiel Esp-istoj neniam forgesu.

*

Ankaŭ la germana aktoro *Alexander Starke* el Erlangen vizitis la klubojn, kaj kun granda sukceso. Rakontante popolfabelojn el Japanujo aŭ Hindujo, regalante per anekdotoj aŭ kun lerta liutakompano ŝerce kantante diversajn popol-kantojn li montris sin la granda artisto.

Post ĝuado de la prezentado de *Starke* jena penso ekestis: Kia manko, ke Espe-

ranto ne same kiel nacia lingvo havas siajn ĉiam pretajn modernajn kontaktilojn al la lingvo-uzantoj (radio, filmo k. t. p.) tiel ke tiuj ofte havu okazon inspiriĝi per la majstra utiligo de la lingvo, ekzemplo de kio estis la *Starke-vespero*.

*

En *Silkeborg* okazis ĝeneralkunveno la 28/8. La prezidanto donis resumon pri la diversaj aranĝoj, kaj la kasistino voĉlegis la bilancon. La jaro estis pro la eksterlanda instruisto iom multekosta, sed pro ofero de la membroj ĝi finiĝis kun kasenhavo de 4 kr. La klubo havas 42 membrojn. Oni reelektis la prezidanton *Gunnar Carlsson* kaj la vicprezidanton kaj sekretarion *Nørgaard Jepsen*. Anstataŭantoj estas f-ino *Elga Flindt* kaj revizoro *Aase Henriksen*. Rilate al la propagando oni decidis anstataŭ propagandvesperon fari ekspozicion ĉe horloĝisto *Henriksen*, kiu afable disponigis unu el siaj fenestroj.

STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO fondiĝis dum la Mainz-kongreso. Ĝi volas disvastigi Esperanton inter studentoj, antaŭenigi ĝian praktikan aplikon en internaciaj studentaj rondoj kaj akceli la internacian kunlaboron de studentoj-esperantistoj. Tiucele oni aranĝos internaciajn renkontiĝojn, funkciigos informservon, subtenos internacian revuon por studentaj esp-istoj kaj klopodos pliampleksigi la reton de studentaj delegitoj de UEA. — Dana peranto: *Sv. Ziegler, Bjernedevej 62, Kbh., Brønshøj*.

„PIONIRSKI LIST“, jugoslava infana kaj lerneja semajngazeto aranĝis peresperantan konkurson por vigligi la enhavon de la gazeto. Oni petas alsendon de tekstoj verkitaj de infanoj 8—15-jaraj pri unu aŭ pluraj el jenaj temoj: *Mia hejmloko. Mia plej interesa okazintaĵo en la vivo. Pri kio en mia patrujo mi plej fieras. Mia plej ŝatata libro(j). kaj heroo en ĝi (ili)*. Sendu nur en Esp. (originale aŭ tradukite)! Bonvenaj estas apudaj desegnaĵoj, bildoj k. s. — La plej grandan parton de la tekstoj oni aperigos dum la sekvanta lernejjaro. — Limdato: 31/10 1958.

EN „KONKORDO“, Esp.-fakrondo de la 2-a distrikta Popolkleriga Sekcio en Bu-

dapest, s-ro P. Balkányi la 8-an kaj 15-an de sept. faris paroladon pri sia vojaĝo al la kongreso en Kopenhago 1956 kaj pri la vivo kaj kulturo de la dana popolo. Samtempe li elmetis malgrandan ekspozicion el bildoj, fotoj, prospektoj kaj libroj disponigitaj de la budapesta Dana Ambasador-ejo. — Tiu estis jam la kvara parolado, kiun Balkányi faris en Budapest pri Danujo.

JENAJN EKSTERLANDAJN GAZET-OJN peras Eldonejo KOKO, Randbølvej 4, Kbh. F., ĝiro 96.289: „*El Popola Ĉinio*“, dumonata, ilustrita, 9 kr. jare. „*Prometeo*“, trimonata, il., literatura, Japanujo, 7,50 kr. jare. „*Nuntempa Bulgario*“, monata, il., socia, kultura, 10 kr. jare. „*Bulteno Gepatra*“, Kanado, por dulingva eduko, 7,50 kr. jare.

Dan-Sveda Esperanto-Tago

La 7-an de septembro en tre bela somervetero okazis la Dan-Sveda-Esperanto-tago. Svedaj kaj danaj geesperantistoj plenigis la rezervitan vagonaron. La 4 vagonoj estis belornamitaj per afiŝoj de la tago, verdaj steloj, Esperanto-flagoj kaj sveda kaj dana naciaj flagoj.

En la du dancvagonoj oni vigle dancis, kaj ĉiuj partoprenantoj vere ĝuis la eblecon promeni tra la tuta vagonaro. La kunportitan manĝaĵon oni manĝis en hotelo „Postgården“, Sorø, kie la loka turista ĉefo s-ro *Schjærff* bonvenigis nin, kaj rakontis pri la vidindaĵoj en Sorø.

Sur la ŝtuparo antaŭ la urbdomo de Sorø, kiu estis tro malgranda por akcepti ĉiujn la 150 partoprenantojn, la vicurbestro s-ro *Hildebrandt* bonvenigis per vere koraj vortoj. Li esprimis inter alie kiel sian opinion, ke Esperanto estas la sola solvo de la lingvaj problemoj, kaj estas la plej taŭga ilo por la interkompreno de la homaro. Grandega aplaŭdo salutis lin, kiam li fi-

nis sian salutvortojn per kelkaj Esperanto-frazoj.

La partoprenantoj rigardis la interesan malnovan kloster-preĝejon, kaj post promonado tra la bela akademia ĝardeno, oni ŝipveturis trans la lagon al la granda restoracio „Parnas“. Tie oni faris la gravan decidon: La venonta Dan-Sveda-Tago okazu en Trelleborg, Svedujo. Ankoraŭ ŝipveturado sur la bela lago al la stacidomo de Sorø, kaj dum la hejmvoyaĝo oni vigle dancis, kantis kaj amuzigis sin. Multan dankon ni ŝuldas al la lertaj komitatanoj por la sukcesplena aranĝo, de la sveda flanko la ges-roj *Andréen*, kaj de la dana flanko s-roj *Katy Bryfelt* kaj ges-roj *Aage Bense*.

Partoprenanto.

Erik Hj. Linder:

Kristana kulturlaboro en nia tempo

Prelego ĉe tutŝtata kunveno de la svedaj liberaj eklezioj. Eldonita de „Esperanto-Missionen“, Nora Stad, Svedujo, 29 paĝoj, prezo nekonata. — De la sama eldonejo sendiĝis „La navigantoj“, faldfolio kun informoj pri la agado de la kristana grupo samnoma.

Kie mi trovas la klubon?

Silkeborg:

Regulaj klubkunvenoj ĉiun duan semajnon (lunde je la 20-a horo) ĉe *Nørgård Jepsen*, Skovvangen 17. La unua okazis la 22-an de sept.

Odense:

5/11: S-ro *H. P. Frodelund* rakontos pri vojaĝ-travivaĵoj en la pasinta somero. — Cetera kunvenplano por la restanta jarparto: 19/11, 3/12 kaj 13/12.

Novaj libroj

ANGLA ANTOLOGIO 1000—1800

Redaktoroj: William Auld kaj Reto Rossetti.
Enkonduka studo: Marjorie Boulton. UEA, Rotterdam, 1957. 319 paĝoj. Prezo: ĉ. 18,50 + sendkosto.

Ĉiu literaturema esperantisto ĝojas kaj fieras, kiam aperas nova antologio, ĉar ĝi signifas por li konon pri la literaturo de unu plia lando kaj novan pruvon pri la taŭgeco de Esperanto kiel interpretilo de plej diversaj literaturaj stiloj kaj genroj. Kompreneble tradukaĵo estas surogato; sed estas nepridubeble, ke la iom progresinta esperantisto multe pli komprenas kaj ĝuas la literaturaĵojn, ĉi tie prezentitajn en Esperanto-vesto, ol tion faras tiu ne-anglo, kiu legas en la originala lingvo la samajn verkojn, — almenaŭ se li ne posedas tute eksterordinaran scion pri la angla lingvo.

En sia enkonduka studo f-ino Boulton — ja tre kompetenta tiurilate — donas interesan resumon pri la historio de la angla literaturo ĝis 1800. La angla literaturo estas impona kaj alte evoluinta, ĉar — laŭ ŝi — post 1066 Anglujo travivis relative pacan kaj trankvilan tempon.

Ni ne pridubas, ke la redaktoroj de Angla Antologio — ambaŭ lumantaj steloj sur nia literatura ĉielo — faris bonan elekton inter la amaso da verkoj. Nur profesoro pri angla literaturo povus tion prijuĝi. Sed ni povas konstati, ke la tradukintoj — krom la du redaktoroj naŭ konataj „nomoj“ — lerte solvis siajn taskojn, prezentante la verkojn en formo, kiu respondas al ĉies epoko kaj etoso. En frutempa poemo efike abundas aliteracio, balkona sceno de Romeo kaj Julieto estas redonita en la ĝusta romantika etoso, k. t. p.

La prozaĵoj (ĉ. 120 pĝ.) ampleksas plej diversspecan legaĵon, beletrikon kaj sciencajojn (ekz. traktaĵon de antaŭ 300 jaroj pri la ebleco vojaĝi al la luno!)

Listo pri neologismoj ampleksas 58 vortojn. Troviĝas en la libro listo pri „libroformaj tradukoj en Esperanto el la angla literaturo 1000—1800“. El la 21 libroj menciitaj 12 estas de Shakespeare.

Angla Antologio signifas gravan pliriĉiĝon de nia literaturo. La impona volumo prezentigas en bela, flava, okulfrapa vesto. Esperinde multaj aĉetos ĝin, ne nur por posedi kaj legi bonan, belan Esperanto-libron, sed ankaŭ ĉar la verko meritas bonan akcepton, — kaj por ke post ne tro longe aperu la du aliaj volumoj de la planita *Brita Antologio*, nome *Angla Antologio 1800—1950* kaj *Skota Antologio 1000—1950*.

E. W.

ESPERANTO - FILMO GERMANUJO

SENSACIA SUKCESO!

Dum la Universala Kongreso en Mainz ESPERANTO-FILMO-GERMANUJO vendis sian gramofondiskon n-ro 001 AL ĈIU KONGRESANO, pruvo por la kvalito de tiu unua Esperanto-disko de E-F-G.

Ĝis kiam provizo estos elĉerpita, ni liveros ĉi tiun PHILIPS-kvalitdiskon 17 cm/45 rpm (longplay) nerompeblan, priĉantitan de RADIOĜORO (60 geviroj) kun jenaj kantoj:

Ĉu ni disiru sen esper'? — *Adiaŭ je nokta hor'* — *La patro migris en natur'* — *Luneburgan Erikejon* — LA ESPERO.

LA PREZO ESTAS NUR 7,00 Germanaj Markoj AŬ EGALVALORO INKL. SENDKOSTOJN. Post alveno de la mono (aŭ 18 resp.kup.) vi tuj ricevos la diskon de ESPERANTO-FILMO GERMANUJO (E-F-G), RUDI BIERNATH, ACKERSTRASSE 53, BRAUNSCHWEIG/GERMANUJO.

NE PRETERLASU
LA GRANDAN PREMIAN
KONKURSON EN „HEROLDO“!

Por niaj filmamikoj: La nova filmo, raportanta pri la UK MAINZ 1958 estos mendebla de 15. 10. 58. Bonvolu ĝustatempe certigi al vi la filmon!

Ernfrid Malmgren:

Allas andra språk Esperanto

Kurslibro por radio kaj studgrupoj, eld. de Förlagsföreningen Esperanto, box 7043, Malmö 7. Prezo: 6 sv. kr.

Multaj lernolibroj en Esperanto havas du gravajn malavantaĝojn. Ĉar la verkintoj ŝajnas opini, ke Esperanto estas komplete lernebla dum kelkaj semajnoj, iliaj libroj enhavas ĉiujn ĝeneralajn gramatikaĵojn kaj — eble kiel sekvon — tro malmulte da (interesaj!) legaĵoj.

Malmgreen scias tion, kaj en *sia* libro li ekz. en la finon lokis la tri lastajn korelativajn grupojn kaj tre humane pritraktis la kunmetitajn formojn. Sed el la sufiksoj estus ellaseblaj (ĉar estas libro por komentoj) „-ing“, „-er“, „mis-“, „-um“, „-aĉ“, „pra-“ kaj „fi-“, krome la vorto „je“ kaj la paragrafo pri elizio.

Avantaĝo en la libro estas la multaj desegnaĵoj, kaj la tekstoj estas kaptaj kaj ofte amuzaj.

La tuta aranĝo de la libro donas bonan superrigardon. Novaj vortoj troviĝas en

FOTO

Aŝtryk

til meget fordelagtige priser. Således kun 26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

Forlang prislister!

Mange års erfaring med forsendelsesforretning. Garanti for omhyggelig udført arbejde.

Nia Foto,
Bjerringbro st.
v/Henning Nielsen,

Telf. 357.
Giro 66122.

kolekto tuj post ĉiu leciono, sed krome kaj vortoj kaj gramatiko troviĝas sur apartaj paĝoj malantaŭe.

La klarigoj estas svedlingvaj, sed tamen la libro estas koninda de danoj.

o. n.

Mi deziras aĉeti ekzempleron de la *malnova* eldono de „Plena Vortaro“ de Esperanto. Ĉu vi deziras vendi?

Bodil Torbell,
Ejstrup st.

DANSK VEGETARISK FORENING

varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt. Ægtepar 8 kr., inkl. abonnement på VEGETARISK TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adresse: Agade 114, II, København N. Telefon: Gothåb 1163 u.

Ni rekomendas al Esperantistoj

restadon en nia unuaklasa hotelo. — Esperanto parolata.

HOTEL DANIA, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

☆ Esperanto-BOGTRYK
Indhent tilbud gratis og uden forbindelse hos Sønderjyllands ældste og største bogtrykkeri —

MODERSMAALET'S Trykkeri
Haderslev — Telefon 22031

A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev